

ESZPERANTÓ B2 MINTAFELADATSOR

I. Olvasáskészség

Olvasáskészség 1

Maximális pontszám: 20

Olvassa el figyelmesen az alábbi szöveget, majd annak alapján válaszoljon *magyarul* a kérdésekre!

Danzeng kaj lia gastejo

Aspekte la pli ol sesdek jara Danzeng estas ordinara tibetano, tamen li kaj lia gastejo estas tre famaj en Xigaze, la dua granda urbo de Tibeto. Vizitgrupoj de 3-5 alilandanoj ofte tranoktas en lia gastejo. La gastejo troviĝas ĉe la bazaro, ĝi estas nova tibetstila domo kun blankaj muroj kaj buntaj fenestroj. Sur la muro ekster la pordo legiĝas la vortoj en la lingvoj tibeta, han-a kaj angla: „Gastejo Danzeng”. En la dekkelkaj jaroj en ĝi tranoktis pli ol dek mil homoj el pli ol dudek landoj kaj regionoj.

Per kio ĝi allogis tiel multajn gastojn? Pri tio Danzeng ĉiam konigas la jenan historion: Iun vesperon kelkaj alilandaj turistoj, ĵus atingintaj Tibeton, embarasiĝis pro tio, ke ili ne trovis konvenan lokon por manĝi. Danzeng gastigis ilin per tibetaj manĝaĵoj, kiujn li mem preparis. Tio ege ĝojigis la turistojn, kiuj gaje diris kun viglaj gestoj, ke ili vidis ĉi tie la veran Tibeton.

Tio havigis al Danzeng la ideon funkciigi gastejon kaj donis al li administran metodon. Li komprenis, ke alilandanoj venis al Tibeto ne por loĝi en luksa domo, sed por sperti la vivon sur la altebenaĵo. Eblas, ke ili bezonas ne luksan hotelon, sed bezonas tranoktejon kun tibetnacia koloro. Danzeng diris, ke la prezo por tranoktado en lia gastejo ne altas, tiu por unu ĉambro estas respektive kvindek juanoj, dek kvin juanoj kaj pli malkara por amasloĝejo. Kia ajn la prezo por unu nokto, la ĉambro kaj litkovriloj estas absolute puraj. Li dungis tibetan kuiristinon kaj liveras al la gastoj tibetajn kaj eŭropajn manĝaĵojn, dum bolinta akvo kaj teo estas liverataj tage kaj nokte. Sur la balkono de la dua etaĝo troviĝas tibetstilaj tendoj, tabloj kaj seĝoj. Tie oni povas ne nur trinki kafon, hordean vinon, buteran kaj dolĉan teon, sed ankaŭ manĝi fromaĝon.

La gastejo Danzeng renomas ankaŭ pro la zorgema servo. Danzeng diris, ke alilandaj turistoj vojaĝantaj en Tibeto ne bone konas la lokon kaj havas malfacilaĵon aranĝi siajn aferojn, do li multe helpas ilin en tio. Li helpas ilin ankaŭ en la mendo de turismaj kaleŝo kaj ĉevaloj. Se iu malsaniĝas, li tuj kondukas lin al hospitalo. Por oportuni al la gastoj, li ekipis la ĉambrojn per televidilo, telefono, ĵurnaloj kaj gazetoj en fremdaj lingvoj.

Antaŭ ol funkciigi la gastejon, Danzeng iam administris butikon, laboris kiel koĉero kaj kuiristo, sed neniam lernis fremdan lingvon. En la komenco, kiam li akceptis alilandajn turistojn en sia gastejo, li parolis kun ili per gestoj. Iom post iom li lernis fremdan lingvon kaj nun li scipovas paroli en tia lingvo pri ĉiutagaj aferoj. Por disvolviĝo de sia kariero, li sendis sian nepinon eksterlanden por lerni lingvon. Nuntempe ŝi estas bona helpantino.

Xigaze, unu el la plej riĉaj lokoj de Tibeto, estas tre bela urbo. Tie troviĝas la templo Zhashi Lunbu, unu el la plej grandaj lamaismaj temploj kaj en ĝi iam loĝis majstro Banĉen la Deko. Post lia nirvano, ĝi fariĝis lia ripozejo por eterne. Pro tio, tiuj, kiuj vojaĝas al Tibeto, nepre vizitas ĝin. Se vi, karaj legantoj, vizitos Xigaze en la estonteco, nepre vizitu la gastejon Danzeng.

- | | |
|--|---------------|
| 1. Hogy néz ki a Danzeng fogadó? | 3 pont |
| 2. Milyen esemény adta az ötletet Danzengnek a fogadónytáshoz? | 4 pont |
| 3. Mire jött rá Danzeng? | 3 pont |
| 4. Milyen ételekkel várja a fogadó a vendégeket? | 2 pont |
| 5. Miben segíti Danzeng a turistákat az étkezésen és szálláson kívül? | 4 pont |
| 6. Mit tett Danzeng, hogy jobban megértse a külföldieket? | 4 pont |



MEGOLDÁS:

- 1. Hogy néz ki a Danzeng fogadó? 3 pont**
1. új, tibeti stílusú ház
 2. fehér fala van
 3. színes ablakai
- 2. Milyen esemény adta az ötletet Danzengnek a fogadónytáshoz? 4 pont**
4. külföldiek nem találtak megfelelő éttermet
 5. Danzeng vendégül látta őket
 6. saját készítésű tibeti ételekkel
 7. a turisták nagyon örültek ennek
- 3. Mire jött rá Danzeng? 3 pont**
8. a turisták nem azért jönnek, hogy luxus szálláson lakjanak
 9. meg akarják tapasztalni a fennsík életét
 10. tibeties szállásra van szükségük
- 4. Milyen ételekkel várja a fogadó a vendégeket? 2 pont**
11. tibeti és
 12. európai ételekkel
- 5. Miben segíti Danzeng a turistákat az étkezésen és szálláson kívül? 4 pont**
13. segíti elintézni az ügyeiket
 14. hintók és lovak rendelése
 15. kórházba kíséri őket, ha betegek
 16. a szobákat felszerelték televízióval, telefontal/idegen nyelvű újságokkal, hírlapokkal
- 6. Mit tett Danzeng, hogy jobban megértse a külföldieket? 4 pont**
17. lassan megtanult idegen nyelven
 18. mindennapi dolgokról tud beszélni
 19. unokáját külföldre küldte nyelvet tanulni
 20. most ő/unokája segíti Danzenget



Olvassa el a hiányos szöveget figyelmesen, majd egészítse ki értelemszerűen a szöveg alatt található szavakkal / szóösszetételekkel! A megfelelő szó / szóösszetétel betűjelét írja a lap alján található táblázatba a számok alá! Felhívjuk figyelmét, hogy 2 betű fölösleges.

Eble vi demandas vin, kio estas la diferenco inter la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kaj ĉiu alia internacia organizo, kiu ___0___ plurajn naciajn organizojn. Kial ne sufiĉas via aktiveco en la loka grupo, kaj kion pli povas ___1___ TEJO al vi?

La respondo estas: multon! TEJO ne nur arigas plurajn landajn sekciojn, ĝi estas io esence alia: TEJO estas por la junularo tio, kio UEA estas por la ĝenerala movado. Esti individua membro de TEJO signifas ___2___ ĉe la centro de la internacia junulara movado.

TEJO donas al vi servojn en granda nombro kaj varieco: Pasporta Servo de TEJO – la unika maniero por malmultkoste vojaĝi kaj samtempe ___3___ kun personoj kaj tradicioj sen helpo de vojaĝagentejoj. Vi trovos senpagan gastigadon en multaj landoj kaj duonmilon da adresoj el la tuta mondo. Ankaŭ vi povas ___4___ gastiganto.

La kunvenoj de TEJO jam estas konataj en la tuta Esperanto-movado. Se vi unufoje partoprenos ekzemple la Internacian Junularan Kongreson de TEJO – vi deziros denove ___5___ ĝin: tiuj kunvenoj havas internacian amikan etoson, kian vi verŝajne nenie alie povos ___6___ . Individua membro de TEJO ĝuas signifan rabaton por la aliĝkotiĝo!

Inter la eldonaĵoj de TEJO elstaras Kontakto – unu el la plej bonaj Esperanto-gazetoj, kaj lingve kaj enhave. Kiel membro vi ___7___ ĝin senpage.

TEJO estas saltejo al la Internacia Esperanto-socio. Vi rapide ___8___, ke vi havas multajn geamikojn en la tuta mondo. Vi ___9___ al tre varia internacia rondo, kiu tamen restas malfermita al la ekstera mondo. TEJO kontaktas kun ne-Esperantaj junularaj organizoj, kaj serioze ___10___ en internaciaj kadroj, kiel la junulara centro de la Eŭropa Konsilio, Unesko kaj aliaj.

- A) aspektas
- B) apartenos
- C) doni
- D) esperi
- E) fariĝi
- F) kunlaboras
- G) kunligas
- H) konatiĝi
- I) partopreni
- J) rimarkos
- K) ricevos
- L) sperti
- M) sufiĉas
- N) troviĝi

0	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
G										



MEGOLDÁS:

<i>0</i>	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
<i>G</i>	C	N	H	E	I	L	K	J	B	F



II. Íráskészség

Íráskészség 1.

Maximális pontszám: 20

Írja le gondolatait idegen nyelven az egyik témáról úgy, hogy minden irányítási szempontra térjen ki! (Az irányítási szempontok sorrendjét nem kell betartania.) Fontos, hogy összefüggő szöveget hozzon létre. Tartsa be a levél formai előírásait (dátum, megszólítás, üdvözlő formula, aláírás)!

Terjedelem: 17-20 sor

Kérjük, hogy a feladat megoldása során – a titkos adatkezelés érdekében – ne használja saját adatait!

I.

Külföldi barátnője idén érettségizik. Jövőre pedig egy igen rangos felsőoktatási intézménybe szeretne bejutni: most, a felkészülés időszakában azonban elég ideges, nyomasztja a gondolat, hogy megbukik az érettségin. Ráadásul nagyon nehéz felvételt nyerni az általa választott intézménybe: óriási a verseny a diákok között. Az illető már arra gondol, hogy felhagy a tanulással, és inkább megvalósítja gyerekkori álmát: manőken lesz. Ön most levelet ír neki, amelyben

- tanácsokat ad neki arra vonatkozóan, hogyan lehet sikeresen leérettségizni, illetve hogyan lehet leküzdeni az idegességet;
- utal arra, hogy milyen előnyökkel jár majd, ha felveszik egyetemre, főiskolára;
- elmeséli egy ismerőse esetét, aki hirtelen félbeszakította a tanulmányait, és most sajnálja a ballépését;
- lebeszéli őt arról, hogy manőken legyen;
- elmondja neki saját tapasztalatát / elképzelését: hogyan vészelte át / hogyan fogja átvészelni Ön ezt a nehéz időszakot.

Vagy:

II.

Ön a nyári szünetben au pair állást szeretne vállalni egy külföldi családnál. Tavaly nyáron már vizsgázott gyerekekre, és nagy örömét lelte ebben a munkában. Olyannyira, hogy elhatározta: olyan hivatást fog választani, ahol gyerekekkel foglalkozhat. Most levélben jelentkezik az au pairt köztudott közvetítő ügynökségnél.

- Leírja, ki Ön, mivel foglalkozik, és milyen tulajdonságai teszik alkalmassá erre a munkára.
- Beszámol korábbi tapasztalatáról és arról, hogyan kapta ezt a munkát.
- Elmagyarázza, miért szerette ezt a feladatot és azt is, hogy milyen nehézségei adódtak munkája során.
- Írja meg, hogy melyik országban szeretne dolgozni, és miért éppen ott.
- Leírja, hogy a jövőben milyen formában szeretne gyerekekkel foglalkozni, és mi vonzza Önt ebben a hivatásban.



MEGOLDÁS

I.

Kara Marta!

Mi legis vian leteron kun intereso. Vi ne devas timi de la abiturienta ekzameno. Ankaŭ mi timis, sed fine mia ekzameno bone sukcesis. Vi ankoraŭ havas tempon, lernu diligente. Eble lernu kun samklasano, aŭ petu helpon de viaj instruistoj. Se vi estas nervoza spiru profunde, provu trankviliĝi, trinku, manĝu ĉokoladon.

Se bone sukcesos via abiturienta ekzameno, vi povos lerni en bona lernejo, kaj pli facile vi ricevos poste bonan laborlokon. La lerneja vivo estas pli gaja kaj pli facila ol la laboro. Mi havas amikon, kiu ĉesis studi kaj nun li pentas. Li trovis nur fizikan laboron, kiu estas tre laciga kaj malinteresa. La vivo de manokenoj eble estas interesa, sed tre malfacila. Ili devas esti tre maldikaj, vi ne povus normale kaj multe manĝi. Mi scias, ke vi ŝatas viziti restoracion, vi devus rezigni pri tio.

Mi lernis por la abiturienta ekzameno kun mia patro. Eble ankaŭ viaj gepatroj aŭ geamikoj povas helpi al vi. Lernu ĉiutage iom, tiel restos tempo ankaŭ por ripozi kaj amuziĝi. Ne lernu nur en la lasta minuto! Mi esperas, ke mi povis helpi. Mi pensos pri vi dum tiuj malfacilaj tagoj. Skribu kiel sukcesis la ekzameno.

Estu kuraĝa!

Salutas Vin:

Petra

Budapeŝto, la 14an de februaro, 2007

Vagy:

II.

Estimata sinjoro!

Mi estas Katalin Szabó el Hungario. Mi estas studentino. Mi ŝatus labori kiel infangardistino en Francio dum la somera ferio. Mi ŝatas infanojn, mi bone kantas kaj volonte mi ludas. Mi konas multajn rakontojn.

Antaŭ unu jaro mi estis en esperanta tendaro kun francaj infanoj. Ni kune ludis kaj ekskursis. Mia instruisto proponis al mi tiun eblecon. La tendaro tre plaĉis al mi. Estis multaj belaj ekskursoj kaj interesaj taskoj. Bedaŭrinde la infanoj ne parolis bone Esperanton, tiel mi malfacile povis paroli kun ili. Tio estis problemo.

Mi ŝatus labori en Francio, ĉar mi volas bone ellerni la francan lingvon kaj mi ŝatus ekkoni francalingvajn kantojn kaj ludojn. En la estonto mi volonte laborus en infangardeno, ĉar mi ŝatas okupiĝi pri infanoj.

Bonvolu informi min pri la eblecoj.

Sincere salutas vin:

Katalin Szabó

Budapeŝto, la sesan de majo, 2007



Az alábbi rövid gondolatsor alapján fejtse ki véleményét indoklással együtt internetes hozzászólás formájában 10-12 sorban a leírt jelenséggel kapcsolatban! (10 pont)

Miaj gepatroj decidis translokiĝi en urbon je 300 kilometroj. Estas por mi terure lasi ĉion ĉi tie kaj komenci novan vivon tie, kie mi konas neniu. Sed estus same terure resti ĉi tie sen mia familio. Kion vi konsilas, kion mi faru?

MINTAMEGOLDÁS:

Kara Amiko!

Translokiĝo estas granda ŝanĝo en via vivo. Mi komprenas, ke vi timas. Mi translokiĝis antaŭ kvin jaroj, nun mi fartas tute bone en la nova loko, certe ankaŭ vi alkiutimiĝos rapide. Se vi iros kun via familio vi povos vin senti hejme en sekureco. Provu rigardi la pozitivajn flankojn de la afero. Eble en la nova urbo vi havos pli grandan loĝejon, aŭ domon, propran ĉambron. Certe vi havos multajn novajn eblecojn. Mi pensas, ke vi trovos novajn geamikojn, ne zorgu pri tio. Mi kredas, ke vi ne perdos viajn malnovajn geamikojn, vi povos facile kontakti ilin tra interreto. Tamen se la nova loko ne plaĉas al vi, vi povos translokiĝi kien vi volas, kiam vi iĝos plenkreska. La translokiĝo estas malfacila ankaŭ por viaj familianoj, helpu ilin kiel vi povas kaj ne grumblu.



III. Közvetítés

Közvetítés

Maximális pontszám: 15

Fordítsa le az alábbi szöveget magyarra!

100 jaroj kun Esperanto-kongresoj

En la jaro 2005 esperantistoj festis la 100 jariĝon de internaciaj Esperanto-kunvenoj. Unue en marto 2005 okazis la renkontiĝo "Boulogne 2005", en la franca apudmara urbo Bulonjo, kie la kreinto de Esperanto, Zamenhof, kun preskaŭ 700 samideanoj, partoprenis la unuan internacian Esperanto-kongreson en aŭgusto 1905. Cent jarojn poste, estis ripetita lia parolado en la sama teatro kiel tiam. Estas kvazaŭ miraklo, ke la teatron evitis la bomboj de la dua mond-milito, kvankam 85% el la urbo detruigis.

Citaĵo el la parolado de Zamenhof:

„En la plej malproksimaj tempoj la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ne plu komprenis unu la alian. Fratoj iĝis ŝajne por ĉiam malamikaj grupetoj, kaj eterna milito komenciĝis inter ili. Nun en la malgrandan urbon de la franca mar-bordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontiĝas ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu la alian. Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu la alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia reciproka kompreniĝado kaj la nia! Ni konsciu la gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.”



Mintamegoldás:

1. 100 év eszperantó kongresszusokkal 1p
2. 2005-ben az eszperantisták a nemzetközi Eszperantó összejövetelek 100 évessé válását ünnepelték. 3p
3. Először 2005 márciusában történt a "Boulogne 2005" találkozó, a francia tengerparti Bulogne városában, ahol az Eszperantó alkotója, Zamenhof, majdnem 700 eszmetárrsal részt vett az első nemzetközi Eszperantó kongresszuson 1905 augusztusában. 4p
4. 100 évvel később megismételték beszédét ugyanabban a színházban, mint akkor. 2p
5. Szinte csoda, hogy a színházat elkerülték a második világháború bombái, habár a város 85%-a romba dőlt. 3p
6. Részlet Zamenhof beszédéből: 1p
7. „A legtávolabbi időkben az emberi család szétvált és tagjai többé nem értették egymást. 3p
8. Testvérek váltak látszólag örökre ellenséges csoportokká, és örök háború kezdődött köztük. 3p
9. Most, a francia tengerpart kis városában összegyűltek emberek a legkülönbözőbb országokból és nemzetekből, és nem némán és süketen találkoznak, hanem megértik egymást. 4p
10. Gyakran jönnek össze emberek különböző nemzetekből és értik egymást: de milyen nagy különbség van az ő kölcsönös megértésük és a miénk között! 3p
11. Legyünk tudatában a mai nap fontosságának, mert ma nem franciák jöttek össze angolokkal, nem oroszok lengyelekkel, hanem emberek emberekkel.” 3p

